

Pri la kongresa rezolucio
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 521, 1981.10.08 & 10

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Fariĝis kutimo konkludi niajn esperanto-kongresojn per la akcepto de rezolucio. Oni povas pensi, ke tiuj ĉi rezolucioj spegulas la diskutojn okazintajn en la kongreso kaj la priokupojn de la kongresanoj. Sed fakte, se oni iom atente ekzamenas tiujn ĉi tekstojn, oni konstatas, ke plej ĝenerale ili estas aro da belaj frazoj, kiuj nek raportas pri la aktiveco mem de la esperantistoj, nek pri la nuna situacio de esperanto. Ili fariĝas pli kaj pli malfacile kompreneblaj, kaj pro tio perdis ĉian efikecon ĉu interne de la esperanto-movado mem, ĉu ekstere de ĝi, ĉe la organizaĵoj, kiujn ili provas atingi.

A.- M prenu kiel ekzemplon la kongresan rezolucion akceptitan ĉisomere en Brazilio. Bonvolu streĉe atenti, kiam ni ĝin laŭtlege, por kontroli, ĉu vi povus aŭ ne resumi ĝian enhavon. Jen ni legas al vi tiun ĉi teikston:

C1.- "Universala Esperanto-Asocio, kunsidante en Brazilio de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1981, dum la 66-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun ĉeestas pli ol 1700 partoprenantoj el 50 landoj,

A.- notante la danĝeron de ĉiam pli fortiĝanta influado de la amaskomunikiloj en la direkton de senindividuigo de la homoj en la moderna amassocio,

Cl.- notante la minacon de ĉiam pliiĝanta submetiĝo de la homoj al unudirekta influado de informoj, al kiuj ili ne havas la ŝancon reagi krom pasive,

A.- notante, ke kultura influado de la grandaj lingvoj de la hodiaŭa mondo tendencas subigi kaj eventuale forigi la malgrandlingvajn kulturojn, kaj senigi ties anojn de la rajto je propra kulturo,

C1.- atentigante pri la celoj de la Internacia Lingvo Esperanto krei ponton inter la popoloj kaj tiel kontribui al vera interkomuniko inter ĉiuj homoj sur la terglobo sur neŭtrala lingva bazo,

A.- konstatas, ke aktiva partopreno de la individuo en kultura interagado estas ebla nur tiam, kiam li/ŝi disponas pri "pontoj" permesantaj dudirektan komunikadon,

Cl.- konstatas, ke la Internacia Lingvo Esperanto jam pruvis siajn kapablojn servi kiel taŭga dudirekta ponto inter diferencaj kulturoj,

A.- konstatas la etikan valoron de la Internacia Lingvo Esperanto en interhoma kaj interpopola komunikado,

C1.- alvokas al individuoj, etnaj grupoj, nacioj, ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj agnoski la atingojn kaj valorojn de la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝian potencialon krei plenkomunan ponton inter la diversaj kulturoj de la mondo, cele al formiĝado de aktiva kaj konscia kulturo, kaj reprezentante, sur internacia skalo, la plej altajn homajn valorojn kaj aspirojn."

A.- Fino de la citaĵo. Tiu ĉi teksto konsistas nur el, unu frazo, kiu grupigas ducent-kvindek-unu vortojn. Estas tute interese stila ĵonglaĵo.

C1.- Verŝajne kelkaj kompetentuloj kunsidis kaj cerbumis dum pluraj horoj por naski tiun ĉi dokumenton, kiu estas alkovo.

A.- Sed kiam oni alvokas, oni havas precizan celon. Ke la alvokato aŭ alvokatoj aŭdu la alvokon, komprenu ĝin.

C1.- Kaj alvokanto, por esti aŭdata, eĉ direktas sian helpokrion al preciza publiko.

A.- Kiam ni legas, ke "UEA alvokas al individuoj, etnaj grupoj, nacioj, ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj" ni tuj konvinkiĝas, ke fakte ĝi nenion havas por alvoki. Ne per sama teksto, oni povas kontakti tiom da malsimilaj hommedioj. Por atingi individuojn oni devas draste paroli. Neniam 251-vorta frazo povas inciti individuojn al aŭskultado kaj ekago.

Cl.- Kaj por atingi etnajn grupojn oni devas agi ankoraŭ alimaniere. En Svislando la romanĉlingvanoj ĵus alvokis je helpo. Mi forte dubas, ke la preskaŭ samtempa alvoko de UEA pere de tiu ĉi kongresa rezolucio iel instigos la etnan grupon romanĉlingvan ekkonsideri la kontrolo de esperanto. Mi eĉ ne volus ricevi la taskon traduki la 251-vortan frazecon de la kongresa rezolucio, ĉar tiu ĉi laboro ankoraŭ pli komprenigus al mi, ke tiu monstra frazo fakte kaŝas enhavan malriĉecon.

A.- Kaj alvoki la naciojn.

C1.- Kaj alvoki la ŝtatojn.

A.- Kaj alvoki la internaciajn organizaĵojn.

C1.- Tion ĉi ankaŭ celas la sama rezolucio. Sed tio ne estas ebla. Naciojn oni ne alvokas sammaniere kiel la ŝtatojn, kaj la internaciajn organizaĵojn oni atingas ankoraŭ alimaniere.

A.- Fakte tiaj rezolucioj, kiajn UEA akceptigas al la partoprenantoj de la Universala Kongreso, estas nura granda intelekta blufado. Ili provas kredi al la esperantistoj, ke UEA kaj la Universalaj Kongresoj de Esperanto estas utilaj al esperanto kaj al la neesperanta mondo. Povas esti, ke ili estas utilaj. Sed tion ĉi la rezolucioj esprimu en komprenebla lingvo kaj per konkretaj ekzemploj.

C1.- En 1969 ni kritikis en la rezolucio de la Universala Kongreso de Helsinko la uzon de la vorto 'delegitoj' dirante, ke en la Universalaj Kongresoj ne kunvenas delegitoj. Tiu ĉi kritiko havis pozitivan influon. Ĉijare ekzemple oni diras, ke la Universalan Kongreson ĉeestis "pli ol 1700 partoprenantoj el 50 landoj." Povu nia ĉijara kritiko instigi la verkantojn de la rezolucio 1982-a havi ion por diri kaj tion ĉi esprimi per komprenebla teksto. Kial rezolucio ne povas konsisti el aro da frazoj? Kial rezolucio ne direktu niajn rigardojn al preciza problemo, kiu nin mem koncernas?

A.- La venontajn semajnojn ni provos ekzameni la temojn, kiujn oni povus utile pritrakti en la kongresaj rezolucioj. Sed vi tuj komprenas, ke ne nur en la rezolucioj, oni devus ilin menciigi, ke ankaŭ en la kongreso mem oni devus serioze ilin analizi. Ĉu tiuj analizoj povas okazi en renkontiĝoj, kiuj fakte pli similas al festoj ol al kongresoj havantaj precizan kunsid-kaŭzon? Jen multaj demandoj, kiujn ni samtempe tuŝis.

C1.- Recenzo ne ĉiam povas esti laŭda. Sed se ĝi estas kritika, ĝi konduku al pozitivaj reagoj. Tion ĉi ni celas. Kaj tial ni decidis esprimi niajn vidpunktojn, kiuj ne estas malfavoraj al UEA mem kaj al la Universalaj Kongresoj, sed al certa sinteno, kiu bedaŭrinde regas en tiuj medioj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond recenzis la kongresan rezolucion de la Universala Kongreso okazinta en Brazilio. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*